Fidilalao F. Henriel



# ESPRIMOJ (AL INFANOJ)

# POR NIN INSPIRI

Memeldono
Antananarivo Aŭgusto 2020

# ESPRIMOJ (AL INFANOJ) POR NIN INSPIRI

*Dediĉe al miaj knaboj, kiuj lernis Esperanton*
*sed ne trovis la vojon plu esperantumi...*

# ENKONDUKO

Mi konscias pri tio, ke estas iom pretendeme proponi tiun ĉi libron al homoj, kiuj edukas infanojn en Esperanto. Sed malgraŭ tio, mi tamen verkis ĝin ĉar la ideo iel obsedis min. Eble por ie kaj iel kompensi la fakton ke mi mistrafis la okazon eduki miajn infanojn en la zamenhofa lingvo ? Sincere dirite, mi ne scias la kialon. Intertempe, necesas precizigi al vi ke mi sola ne povis tion fari sen la impulso donita de mia franca amiko pri kiu nur kaŝnomon mi konas, t.e. Marko Mirindo. En 2013, li ja kuraĝigis min finpretigi la libron kaj li eĉ serĉis la eblecon aldoni enen kelkajn desegnaĵojn. Bedaŭrinde, li senkiale ĉesis korespondi kun mi kaj malaperis el miaj kontaktoj.

Al la eventualaj legantoj do mi proponas kelkajn utilajn esprimojn pri la ĉiutaga vivo, en rilato kun la kunvivado kun infano. Ege varias la temoj sed ni ne povas aserti ke ili kovras ĉiujn niajn tagajn bezonojn. Daŭre plibonigindas la enhavo kaj eĉ kritikinda je diversaj vidpunktoj.

Mi devas konfesi ke tre malfacilis trovi homon (gepatrojn) por provlegi la manuskripton. La ĉefa ekskuzo estis la manko de tempo. Sed pli malkuraĝiga estis interveno farita de iu esperantisto, kiu diris ke neniu bezonas modelon por « karesa voknomo por la infano » --- kvazaŭ la esprimo spontane kaj aŭtomate venus en nian buŝon ! --- .Ĉu ĉiuj Esperanto-uzantoj samopinias pri tio ? Laŭ mia opinio, Esperanto daŭre serĉas sian vojon precipe pri uzado de tiu lingvo sine de la familio. Evidentiĝas ke la proponitaj enhavoj estas nur proponoj, kiujn ni intencas altrudi al neniu. Ĉiuokaze, la aŭtoro restas malfermita al ĉiuj kritikoj kaj eventualaj proponoj.


Mi deziras nur ke tiuj esprimoj trovu sian taŭgan uzadon eĉ ekster la edukado de niaj etaj infanoj. Ĉar ankaŭ plenkreskuloj *inspire* bezonas esprimi siajn ideojn kaj emociojn.

*Avaratsena Ambohidrapeto*
*Malagasio*
*la 30an de januaro 2020*

*FIDILALAO Henriel*
*<henrielredtv*gmail.com>*

# ENHAVO


1. Ĉiutaga hejma vivo ... 7
2. Eksterordinaraj eventoj/okazintaĵoj hejme ... 14
3. Familiaj festoj kaj donacoj ... 20
4. Feriumi ... 22
5. Akcepti iun en la stacidomo/flughaveno ... 24
6. Hejma aktivado ... 24
7. Esprimi senton ... 27
8. Io okazanta surstrate/en publika loko/en veturilo (aparte en komercaj lokoj) ... 30
9. Kun la dom-bestoj ... 31
10. Rigardi spektaklon/ĉeesti matĉon ... 32
11. Enveni restoracion ... 32
12. Pri ĉio rilate la lernejon ... 33
13. Dum gastado ĉe ies domo ... 35
14. Vetero, klimato kaj sezonoj ... 35
15. Ĉe la ĝardeno/parko kaj la mondo de plantaĵoj ... 36
16. Ĉe la mondo de bestoj kaj insektoj ... 37
17. Televido ... 38



## 1. Ĉiutaga hejma vivo

### Karesa voknomo por la infano

Mia bebo
Mia bMia infaneto
Mia uleto
Mia princ(in)(et)o/reĝ(in)(et)o
Mia pupo
Mia besteto/kateto/hundeto/urseto/birdeto/ŝafeto
Mia (plej) amata
Mia (plej) kara
Mia adorata
Mia karul(in)(et)o
Mia preferata
Mia ludilo
Mia anĝeleto/anĝelin(et)o
Mia unikaĵo
Mia unikulo
Mia riĉaĵo
Mia trezoro
Mia heredaĵo
Mia belul(in)o
Mia ĉarmul(in)o
Mia oro
Mia diamanto
Mia safiro
Mia juvel(in)o
Mia vivo
Mia amo
Mia koro
Mia vivero

### Vekiĝo

#### -por veki la bebon kaj infaneton

Etul(in)o mia, nun vekiĝu !
Malfermu l'okulojn
Eliru el via sonĝo
Eliru el via dormo
Ne duondormu
For la dormo !
Ne re-endormiĝu mia karul(in)eto
Jen rigardu nian etan pigrulon, kiu oscedas
Sufiĉe da dormo, mia kara !

Jam helas nun, sufiĉe !
Jam taĝiĝas mia kara,…

### -por iom skui la infaneton

Hej, la suno jam aperas
Ek ! Ek  al maldormo !
Ne pigru, vekiĝu tuj !
Estas temp' por vekiĝi/labori
Hop, vekiĝu kaj tuj ellitiĝu !
Rapidiĝu al maldormo
Sonas la horo, pigrulo
Sonas la trumpet' soldato
He gliro*, jam ne vintras (*eblas ekrakonti ion pri gliro)
Reĝo mia, devo atendas,do tuj vekiĝu
Tagiĝas, do ne estu otuso* (*eblas rakonti ion pri otuso/orelstrigo)
Jam sufiĉe dormemulo
Haltigu la emon dormi

### -por grupo da infanetoj

Bando da nenifarantoj, ekstaru tuj !
Bando da moluloj, kion vi atendas por vekiĝi !
Malvarman akvon se vi malfruas sur la lito !

### -okaze de alarmo

He, vekiĝu, io estas ekstere/iu trairas la korton
Urĝas/urĝegas, vekiĝu tuj !
Nepre vekiĝu tujtuje !

## Matenmanĝo  kaj tagmanĝo

### -pri ĉio rilate ĝentilecon

Lavu/purigu la manojn antaŭ ol manĝi
Ne leku la fingrojn
Estas malĝentile paroli per plena buŝo
Malpermesite 'stas ludi/moviĝi dum manĝado
Ne bru-maĉu
Viŝu vian manon/buŝon
Ne ĉiom engluti
Paciencu, ni ekmanĝos post du minutoj
Hej, atendu/respektu vian vicon, nedecas preni ies teleron
Tenu bone la forkon, manĝaĵo ŝmiras vian vizaĝon
Ne ĉiom/ĉion manĝu. Pensu ankaŭ pri la aliaj/viaj gefratoj
Ne ĉiom manĝu, gardu parton por morĝaŭ
Ne tro plenigu vian glason, ĝi elversiĝos kaj malpurigos la tablotukon
Ne faligu la glason
Ne faligu la manĝilaron
Unue englutu la enbuŝan manĝaĵon, ĉiufoje nur unu glutaĵon
Uzu buŝtukon. Serĉu viŝilon. Ne viŝu per via vestaĵo

Ne vomu tion, kion vi englutis
Ne plu enbusigu la jam elbuŝigitaĵon

-instigi plu manĝi

Rigardu tiun belan kaj bongustan kukon faritan de panjo
Brave ! Li/ŝi ekas enbuŝigi unu…kaj du…kaj tri glutaĵojn
Finu vian manĝaĵon/teler-enaĵon. Unue finu ĝin kaj nur poste vi rajtas ludi
Hum, sentu la bonodoron ! Panjo eble preparas ion magian !
Mi aĉetis por vi ekzotikan manĝaĵon. Vi diru al mi kiom bongustas ĝi
Kion vi la plej ŝatas : omleton aŭ frititan terpomon ?

-konsili

Ĉu vi jam trinkis tiun bongustan fruktosukon ? Ankoraŭ ne ? Nu, provu
Turnu la korkon aliadirekten
Lasu malvamiĝi. Enblovu sure por ke ĝi malvarmiĝu
Trinku vian sukon/akvon/vinon
Helpu al la fratino prepari/aranĝi/liberigi la tablon
Se vi ne eltenas fromaĝon, prenu tutsimple varman lakton
Manĝu ne tiel rapide, tio malbonigas vian sanon
For tiun fotoalbumon manĝante
Manĝante ne ekdormu, nepras forlasi la hejmon tre baldaŭ

-atentigi pri eventuala danĝero

Atentu ! Vi riskas bruliĝi ĉar varmegas tiu supo
Rigardu bone, etaj ostetoj povas esti en tiuj legomaĵoj
Ne trinku ĝin, ene estas forta alkoholaĵo
Danĝeras tiu akra tranĉilo !
Ĉu vi ne sentas ke fiodoraĉas tiu ĉi kremo ? Forĵetu ĝin kaj prenu alian
Vi ne rajtas manĝi tiun ĉi ĉar ĝi povus igi vin malsana

Ludado

Kien vi metis/aranĝis vian ludilaron ?
Ĉu vi ne jam ludis la belan pupeton ?
Kiom belegas la jenaj ludiloj !
Superrapidas via polica aŭteto
Ne, malbelegas la vizaĝo de la soldateto
Nepras ke vi pruntedonas viajn ludilojn se vi volas havi geamikojn
Vi ne rajtas forpreni ies ludilojn sen permeso far la posedanto
Vi rajtas ludi pilkon ekstere
Hej, eksteren kun via pilko !
Evitu frakasi la fenestran vitron per tiu pilkaĉo
Ordonmetu viajn ludilojn/aferaĵojn en sian lokon/ejon
Ne staru sur la seĝo nek sur la tablo
Ne kuru en la ŝtuparo, tio estas dangera
Neniam tuŝu la kaserolojn. Ili bruligas. Ne restu/ludu en la kuirejo

Kaptu la pilkon. Brave ! Kaj alĵetu ĝin nun al paĉjo. Oj ! Mi mistrafas ĝin
Ne ŝtonĵetu al homoj/fenestroj/vitroj
Atentu ! Malsupren la kapo. Ĝi riskas frapiĝi kontraŭ io
Mallaŭte, nepras ne veki aliulojn
Ne forprenu la ludilon de via kamarado
Ĝi estas ne via, tuj redonu ĝin
Ne forĵetu sur la plankon lian ludilon, prenu ĝin kaj redonu al li, alie vi estus kruela infano
Pruntedonu la ludilon, estu afabla
Venu ludi eksteren/internen/supren/suben/ en la terason
Ĉesu bruigi per viaj piedoj
Iru ludi en vian ĉambron. Vi bruegas
Kontrolu ĉu la najbaroj estas tie. Eble ili emus ludi kun vi
Ĉesu, vi suferigas lin/ŝin
Restu for de la kuirejo dum la kuirado, ja danĝeras
Ne iru en la ŝtuparo surmetante viajn ŝtrumpetojn
Paĉjo riparos la ludilon. Ĝi estas rompita
Mankas rado al via aŭteto
Ne kuradu/kriaĉu en la ĉambro
Iru/marŝu delikate/senbrue
Ordigu la ludilojn. Finita la partio !
Venu helpi min por ordigi. Metu en la skatolon kaj poste ĉion en la tirkeston
Kiam vi ĉesos krii, mi ekludos kun vi
Ne kriaĉu, ordonmetu viajn ludilojn kaj ne fuŝparolu al panjo
Ni baldaŭ ludos. Promesite !
Bubaĉoj, finu vian partion kaj transiru al la banejo/duŝejo

-infanludoj :

Ku !ku ! Kiu ĉeestas ?
Kaŝludo : « Jen, mi estas kaŝita ». « Mi (ek)trovis vin/(ek)vidis vin ! »
Mi tuj forkaptos vin, ek al kur(eg)ado/ekkuru !

-ludi biciklon :

Biciklu malrapide
Tenu firme la stirstangon/stirilon kaj pedalu normale
Atentu la ĉenojn, ili povas vundigi
La ĉenoj estas interrompitaj, mi riparos ilin (*eblas aldoni foton de biciklo kun la nomoj de la diversaj eroj)
La rado malŝveliĝis, donu al mi la puŝpumpilon por ŝveligi ĝin
Atentu, iu bolto deiras de sia loko
Ne transsaltu tiun obstaklon, tio estas danĝera
Ne timu fali, paĉjo tenos la stirilon kaj vi pedalu
Ne gravas, ekstaru kaj rajdu denove, tiel vi mem lernos bicikli por trovi la ekvilibron

## Vespermanĝo kun la gefamilianoj

Ne manĝu tro multe ĉar tio malfaciligas la digestadon
Ne trinku tro multe, vi riskas urini ĉelite
Kafo estas nur por plenkreskuloj, ne por infanoj

## Antaŭ la enlitiĝo

Nun estas temp' por dormi, mia xxxx
Venu en miajn brakojn por dormi
Venu por ke paĉjo lulu sian plej amatan bebon
Dormu, dormu, panjo gardos vin sekure
For ĉiuj ĝenoj, lasu mian anĝeleton dormi pace/serene/kviete/trankvile
Dormu karulineto, anĝeloj ĉirkaŭas vin
Dormu kun mil dolĉaj revoj mia kara
Faru belajn revojn dum via tuta nokto
Tiu ĉi nokto estas via, estu feliĉa mia karulineto
Rigardu, via pluŝa urso/urĉjo jam dormis

Panjo malŝaltas la lumon, belan revon al vi
Jam tro malfruas, dormu nun
Kial vi ne dormas, ĉu io timigas vin ?
Ĉesu pripensi pri tio, dormu unue kaj ni vidos morĝaŭ (*eblas rakonti/legi fabelojn kaj mirrakontojn kaj lulkanti)

## Banado/duŝado/

Venu por baniĝi. Panjo banigos vin. Ne timu akvumi, la akvo estas ne tro malvarma
Kial vi timas ke oni akvumas vian etan kapon. Jen jen panjo verŝas iom post iom akvon sur vin.
Ho mia etulo, ne tro moviĝu, vi riskas eskapi el miaj manoj
Pardonu al panjo, iom da sapo eniris vian orelon/okulon
Venu kun paĉjo en la banujon

Jen sapo por lavi viajn manojn. Prenu ĝin.
Ne tro turnu la kranon, la akvo ŝpruĉos al via vizaĝo kaj vi sufokiĝos
Tralavu bone la vizaĝon kaj viajn manojn, rigardu, iom da sapo ŝaŭmas en via hararo
Vi ne sufiĉe frotis vian kruron, da malpuraĵo restas
Vi nur alverŝis akvon sur la korpon, pigrulo ! Reiru al la duŝejo tuje !
Lavu bone ankaŭ la naztruojn kaj la oreltruojn
Kiun kremon panjo kutimas ŝmiri al vi post la banado ?
Montru al mi la dentojn, mi diros al vi kiel brosi ilin

Jen lavtuko, vi viŝu vin bone kaj ne tiom rapide
Bone viŝu vian hararon por sekigi ĝin, alie vi malvarmumos

## Vestado

Panjo metos novajn vestaĵojn al sia bebo (*eblas citi kelkajn nomojn de vestaĵo)
Jen belega piĵamo por mia infaneto
Panjo revindos vin, via tuko malsekas
La manikoj tro longas, mi krispos ilin
Tiu ĉi kalsono estas tro prema, oni devas ŝanĝi ĝin
Vi enmetis malsaman paron da ŝtrumpetoj
Post banado, metu viajn sandalojn
Formetu tiujn aĉajn ŝtrumpetojn, ili jam fiodoras
Ĉu vi ne sentas ke via subvesto ŝviton odoras ?
Ĉu vi ŝatas tian parfumon ? Panjo ĵus aĉetis ĝin

Ĉi ni provos la ĵus aĉetitajn ŝuparojn ?
Panjo eraris pri la grandeco de via pantalono, tiu ĉi tro larĝas/stretas
Mi scias ke vi ŝatas pantalonon kun femuraj poŝoj sed mi ne jam aĉetis tian, do bv meti tiun ĉi kaj ne faru skandalojn
Montru al paĉjo kion ni aĉetis por vi en la kasked-butiko
Ĉu vi emas vestiĝi kiel tiu fama stelulo ?
Kial vi ne diris « Ne ! » dum la aĉetado de tiu T-vesto ? Ne tedu min
Ĉesu moviĝi, mi ne intencas tikli vin
Kial vi ĉiam postulas ĝinzon ? Ĝi ne taŭgas por tiu ĉi evento !

## Korpopurigado kaj higieno

Viaj ungoj jam longas, mi fortranĉos ilin
Via kalsono malpuriĝas, do ŝanĝu ĝin tuje
Kial la maniko de via ĉemizo estis deŝirita ?
Nepras ke vi ŝanĝu vian kalsoneton ĉiutage
Via nazo morvas, forviŝu ĝin ne per la mano sed per via naztuko
Ĉu vi ne hontas, granda morvemulo ?
Da parfumo al la bebo de ŝia panjo
Necesas gladi viajn vestojn

## Kombado

Via hararo taŭziĝas, venu por ke mi kombu ĝin
Mi aranĝos vian hararon
Via hararo jam longas, paĉjo fortondos ĝin
Ni iros al frizisto por plekti vian hararon
Ĉu vi ŝatas ke panjo iom oleos vian hararon ?

## Esprimoj pri sekso kaj intimaj organoj

Vi havas fikutimon enŝovi la manon en viajn generilojn
Ne hontu montri al panjo viajn generilojn
Ne eligu vian penison, ne decas ludi ĝin !
Rigardu, tiu aĵeto via nomiĝas peniso/vulvo, ĝi estas pisilo
Tenu bone la penison kiam vi urinas en la necesujo

Virino ja sidas kiam ŝi pisas ĉar ŝi ne havas penison
Panjo vidas ke la eta virino havas belajn mamcicojn

Ripozi

-en la ĉambro :
Vi tro multe ludis, ripozu dum momenteto
Eble necesas ke vi iom dormu por refortiĝi
Ne gravas, kuŝiĝu sur la planko ĉar estas varme nun
Jen kuseno, ripozu iomete sur la fotelo

-ĉe la naĝejo :

Atendu panjon, ŝi metos vin en la akvon
Ne tuj saltu en la akvon, vi riskas vundiĝon

Feki kaj urini

Panjo, bv veni ĉar malsekas la bebo
Rigardu, ŝveliĝas la bebvindaĵo, eble li/ŝi kakis/fekis aŭ pisis
Momenton, mi ŝanĝos vian vindaĵon, ne ploru
Aj, aj, aj ! Kia odoraĉo, vi silente kakis ene !

Nun, vi estas sufiĉe granda, diru al panjo « pispoto » antaŭ ol pisi/urini
Via kalsono humidiĝas pro piso, mi punos vin se vi refaros tion !
'stas malpermesite pisi en la ĝardeno, nur en la pisejo/urinejo/necesejo
Sidu bone sur la necesujo
Enmanigu al vi la necespaperon
Ne forgesu elkrani la akvon post la fekado/kakado
Ne ludu kun la akvo-ŝpruĉigilo de la necesejo

Eventuale, preĝi (ĉe vekiĝo/dormo aŭ antaŭ la manĝo)

-antaŭ ol dormi :

Sinjoro, ni fide enmetas en viajn manojn nian vivon dum tiu ĉi nokto. Estu for de ni ĉiuj malbonaĵoj. Amen !

-je la vekiĝo :

Vi estu dankita Sinjoro pro la protekto farita de vi al ni kaj pro la nova tago de vi donacita al viaj neindaj servantoj. Via Graco kovru nin ĉiujn. Amen !

-antaŭ la manĝo :

Benu Sinjoro tiun manĝon por ke ĝi alportu sanon kaj forton al ni. Kaj pardonu al niaj pekoj. Amen !

## 2. Eksterordinaraj eventoj/okazintaĵoj hejme

### Malsaniĝo/vundiĝo de la gefamilianoj

Via kapo/korpo varmas/varmegas, eble temas pri febro (*eblas  aldoni vortstokon pri nomoj de malsanoj funkcie de la korpoparto + tiuj de la plej oftaj malsanoj)
Via temperaturo estas iom alta
Kio okazas al vi, viaj vangoj nenormale ruĝiĝas ? (*eblas aldoni vortstokon pri simptomoj de malsanoj)
Vi tremetas, ĉu malvarmumo ?
Tiu tuŝego via simptomas  malsanon
Kio/kie doloras al vi, karul(in)eto ?  Ne sekretigu tion
Ĉu io suferigas mian infaneton ?  Diru al paĉjo pri kio temas
Kial vi lamas ?  Eble vi ie vundiĝis sed vi kaŝas tion al ni ?
Lasu min manpalpi vian frunton
Aj, aj, aj, via korpo estas kvazaŭ forno, minacas konvulsio
Nia bebo ploradas, eble li suferas pro io
Atentu, tiu bebo kvazaŭ sufokiĝus kaj io sonas en liaj  pulmoj
Ŝajnas al mi ke tiu bebo pli kaj  pli malpeziĝas
Li nenormale dikiĝas
Lia nazo sangas
Nur supraĵas la vundo, feliĉe ke viaj ostoj  ne rompiĝis
Io eniris en lian okulon
La artiko/ maleolo tordiĝis

Aŭskultu trezoro, panjo malsaniĝas kaj bezonas kvietecon
Avinjo estas enhospitaligita, estu saĝa restante hejme
Nepras urĝe konduki ŝin al hospitalo

### En la kuracejo/ kun la kuracisto

Ne timu nian doktoron, li ne faros injektaĵon al vi
Nia doktoro estas afabla, lasu lin brustaŭskulti vin
Trankviliĝu, tiu doktoro volas nur palpi vian ventron
Vi vidas, nenion doloran doktoro faris al vi
Ni devas atendi nian vicon, la doktoro estas akceptanta alian homon
Jen estas nia familia doktoro, diru al li pri kio vi suferas
Ĉu vi aŭdis la rekomendon far doktoro ? Vi ne plu rajtas manĝi glaciaĵon

### Rilate medikamentojn

Venu preni vian tagan medikamenton
Malfermu bone vian buŝon por ke mi enigu tien la kulereton
Hej, ne vomu tiun pilolon, ĝi igos vin sana
Se vi saĝe englutas tiun antibiotikon, mi donos al vi mielan bombonon
Injektaĵo gravas por rapidigi vian resaniĝon
Ĉiuj etaj infanoj eltenas injektaĵon, kial ne vi ?
La doktoro diris ke tiu flava pilolo forigos vian tuŝadon, do penu ĝin kaj trinku iom da akvo poste

Mi devigos vin preni tiun siropon se vi rifuzas, tio estas por via bono
Vi ja kapablas engluti la unuan pilolon, kial vi ne faros la samon kun tiu draĝeo ?
Tiu ĉi medikamento tre tre valoras, do ne vomigu ĝin, mi petegas
Infanoj kiuj ne emas preni medikamentojn neniam resaniĝos
Rigardu, kiom rapide li englutis la pilolon ! Brave !
Mi kalkulas ĝis tri kaj vi fintrinku la siropon. Unu, du, tri, …Bonege farita !!!
Ĉu vi ne hontas antaŭ via frateto ? Almenaŭ li, li kuraĝis preni sian medikamenton
Mi punos vin se vi denove teren ĵetas la medikamenton
Ne vi rekomendas sed la doktoro, vi prenu tuj tiun medikamenton

Vi ne rajtas abrupte moviĝi, vi devas atenti vian gipsbandaĝon
Kompreneble, la unua masaĝo iom doloras sed poste via tordita maleolo bonfartos
Via malvarmumo/gripo bezonas inhalaĵon

## Forpaso de iu homo

Avinjo ĵus mortis ĉi-matene, Dio kompatu sian servistinon !
Nia olda najbaro forpasis
Mi ege bedaŭras diri al vi ke Xxxxxx mortis pro kancero
Mia koro doloras aŭdi ke mortis mia plej kara amiko
Tristigas min la novaĵo pri la forpaso de mia kolego

## Akcidento trafinta iun homon

Avo havis kor-atakon, nepras ke ni iru al la hospitalo tuje
Aŭskultu karaj, Onklon Andreo trafis akcidento de motorciklo, li komatas/senkonscias
Nia amata onklino svenis, ni kuŝigas ŝin sur la lito

## Vizito far fremduloj

Salutu niajn gastojn
Kial vi ne salutas vian nevinon ?
Ne per la maldekstra mano oni salutas sed per la dekstra
Jam delonge vi ne renkontis vian kuzon, kisu lin
Mi prezentas al vi vian onklon Xxxxx, kiu vivas en Afriko
Ĉu ĝojigas vin interkonatiĝi kun sinjorino Xxxxxx ?
Ne, ne hontu saluti lin, li estas proksima parenco al ni

Via onklo kunportis por vi donacon, danku lin tuje
Nia gasto deziras babili kun vi, rakontu al li kion vi faras en la lernejo
Montru al mia kolegino kiom vii lertas pri la hispana lingvo, ek ! ek !

Ne agitiĝu antaŭ la gastoj, estu saĝa
Ne ĝenu niajn gastojn per viaj stultaj demandoj
Ne profitu la ĉeeston de la gastoj por fari skandalon
Ne profitu la alvenon de via nevo por petolaĉi
Kiam paĉjo kaj panjo babilas kun la gastoj, vi ne rajtas eniri en la salonon

## Akcepti gastojn

Montru al via eta kuzo vian ĉambron
Diru al li ke li rajtas ludi kun vi en tiu ĉambro
Alkonduku nian gaston al la teraso por admiri la pejzaĝon
Helpu vian kuzinon kunporti tiun saketon supren
Ne faru bruon ĉar nia gasto dormas supre, li lacas pro la vojaĝo
Ĉu vi konsentas disdividi vian liton kun via nevo ?
Ĉi-nokte, vi dormos kun mi ĉar via lito estos por la eta kuzino

## Renkonti kun aliaj infanoj

Rigardu kiom saĝa estas tiu eta infano, vi devas imiti lian sintenon
Jen estas via kuzo X, li lernas en la sama klasnivelo kiel vi
Kial vi ne tuj iras ludi kun nia eta gasto ?
Estu afabla antaŭ X, li ne kutimas manĝi tro rapide
Tiu X ĵus perdis sian patrinon, montru al li ke vi estas taŭga amiko

## Preparado de vojaĝo far unu el la gepatroj

Estu saĝa ĉar paĉjo devas vojaĝi for
Panjo forestos dum kelkaj tagoj kaj nia helpantino prizorgos vin, ne timu
Panjo preparas la valizon de paĉjo ĉar li foriros al X pro sia laboro
Kiam mi estos en X, mi telefonos al vi ĉiuj
Dum mia foresto, se vi bezonos ion, diru tion al via frato
Mia laboro devigas min forlasi vin dum unu semajno, mi kunportos memoraĵon al ĉiu el inter vi
Vi ne rajtas akompani min tien, temas pri laboro
Mi vojaĝos ne por feriumi sed por labori
Eĉ mi ne deziras forlasi vin sed de tiu vojaĝo dependas nia vivteno

## Ĉe telefonado aŭ skajpado

Estu trankvila, mi estas telefonanta
Nenion mi aŭdas skajpante, vi tro bruemas
Kiam panjo telefonas, ne deprenu de ŝi la telefonilon

X volas paroli al vi, jen la telefonilo
X ĵus vokis vin sed vi estis ekstere, nun telefonu lin
Ĉu vi ŝatas skajpi kun panjo ? Ŝi estas konektanta nun
X invitas vin skajpi kun li nun, venu tien ĉi

Diru ion, ne restu senvoĉa
Diru “saluton panjo ! Mi sopiras al vi. Mi amas vin panjo !”
Ne diru al via patro ke avino estas ĉe ni, tio estu bona surprizo kiam li alvenos
Parolu laŭte, paĉjo apenaŭ aŭdas vin
Rigardu rekte al la kameraeto

Ĉu vi distingas kiuj estas sur la komputila ekrano ?
Alĝustigu vian kaskon kaj ĝian mikrofonon
Ĉu via kasko bone funkcias ? kaj la mikrofono ?
Ĉu vi aŭdis kion panjo sendos al vi/kunportos por vi, laŭ ŝi ?

## Ekscesa petolado

Ho, vi tro petolaĉas mia amo
Vi kuraĝas petolaĉi ĉar vi scias ke neniu punos vin
Ne tro petolaĉu mia trezoro, vi lacigas paĉjon
Se vi petolaĉas, mi ne havas la eblecon kontentigi vin

Ĉesigu petolaĉi, mi petas
Mi postulas ke vi haltigu vian petolaĉon
Mi avertas vin kaj tion mi ne ripetas dufoje, ne petolaĉu
Via petolado havas limon, ne transiru ĝin
Vi ne rajtas postuli
Kial mi nepre cedas al via troa petado ?
Panjo ne plu eltenas vian petoladon
Kio okazas al vi tiel paŭtante ? Mi ne ŝatas tion
Enirigu tiun malbelan liparon, kiu grimacas
Ĉu vi kredas ke paŭti estas la plej taŭga maniero ?
Kia obstinemulo vi estas !
Eĉ paŭtante dumtage, vi nenion akiros de mi !
Eĉ multaj larmoj/kriaĉoj ne helpos
Kial vi rifuzas paroli al via patro ?
Ĉesu mise rigardi vian patrinon, ĉu ŝi estas via malamikino !

## (Mal)permesi

Paĉjo permesas  al vi …
Vi rajtas …
Neniu punos vin se vi …
Ja jes, vi estas tute libera tion fari !
Faru kiel  plaĉas  al  vi
Amuziĝu  vi
Tion tre  ŝatas via patro

Ne faru tion
Ne tuŝu ĝin
Ne parolu tiel

Vi ne devas …
Vi ne rajtas…
Estas malpermesate (al vi) …
Nepre ne alproksimiĝu al tiu forno
Nepras ke vi …
Neniam skribaĉu sur la muron
Neniel eliru tiun korton sen mia permeso

Panjo punbatos vin se…
Paĉjo ne toleros vian malsaĝon se vi…
Paĉjo koleriĝos se vi …
Se vi daŭre …, vi trovos min

Buŝo fermita !
Silentu !
Ne plu !
Sufiĉas !
Sufiĉe !
Ne !
Halt !
He !

(Mal)konsili

Mi konsilas vin …
Se mi estus vi, mi …
Aŭskultu min, …
Mia ideo estas ke …
Ĉu vi deziras gajni ludilon, …

Mi ne konsilas vin …
Mi malkonsilas vin …
Mi ne tro ŝatas kuraĝigi vin …
Ne ĝoju tro frue, …

Atentigi pri danĝero (akcidento, elektro, medikamento kaj veneno…) aŭ pri io malbona (ekz. pri mensogo, maldecaj vortoj kaj gestoj…) (*eblas aldoni liston de danĝeraj materialoj)

Atentu !
Atentu vian kapon !
Ne ĉiu ludos bonas
Danĝeregas tuŝi tiun elektroŝtopilon
Nepre ne ludu elektran fadenon
Infano ne devas ludi kun medikamentoj, ili estas veneno
Foriru tuj de tiu loko, la muro forfalemas
Formetu tiun kaskon, ĝi malbonigos viajn orelojn

Neniam mensogu, tio estas malbona
Mensogema bubo ne akiros la Paradizon
Dio hatas mensogemulon
Elektu vian amikon, ne ĉiu amiko bonas
Mi ne volas ke vi ludu kun tiuj buboj, kiuj diras maldecajn vortojn
Ne decas primoki tiujn povrajn handikapulojn

Mi admonas vin, ne trakuru sola la ŝoseon
Mi avertas vin/atentigas vin pri…

Puni/ timig(et)i/pugnbat(et)i/vangofrapeti

Pro malsaĝo, mi tuj punos vin
Vi meritas esti punata
Mi batos vin per mia leda zono
Mi vangofrapis vin ĉar vi ne respektis panjon
Ĉar por vi ne plu sufiĉas admono, ĝin anstataŭos bastono
Eble eĉ bastonon vi ne timas ?

(Mal)laŭdi/(mal)gratuli

Brave !
Gratulon !
Vi meritas laŭdon
Vi estas admirinda
Vi estas nia heroo/ĉampiono/stelulo
Rigardu, vi ekfamiĝas
Indas vin aplaŭdi

Kia fuŝulo !
Vi havas neniam meriton
Vi estas nur malkuraĝulo/timemulo/virineca
Rigardu, vi fifamiĝas
Estu vera viro !
Vi ĵus mistrafis indan okazon
Mi hontas pro via gesto
Ĉu vi ne hontas … ?
Jen la ĉampiono de ĉiuj fuŝaĵoj
Ni ja ĉeestis la plej indaĉan spektaklon
Kion vi faris estas  ne laŭdinda

Kuraĝigi

Kuraĝe !
Estu kuraĝa !
Ni ĉiuj subtenas vin !
Vi ne estas sola, …
Kredu min, alia homo suferas pli ol vi
Tio estas nur eta vundo, baldaŭ ĝi cikatriĝos
Panjo telefonis kaj diris ke ŝi ciam pensos pri vi
Ne timu, ni staros nur iom pli malproksime de la futbalejo
Ni fieras pri vi, mia kara bubaĉo
Ne estas danĝero, iru tien
La samaĝa filino de la najbaro kapablis tion fari, kial ne vi, mia kara ?

Ironii kaj primoki

Kaj mi kredis ke vi kapablas pri tio !
Ĉu vi ne estis la ĉampiono en tiu ludo ?
Nun mi vidas ke mi seniluziiĝas !

Je via loko, mi forfuĝus de ĉi tie
Bv noti ke daŭre mankas al vi io eta
Mi ne povis reteni mian ridadon
Denove fuŝo kaj mistrafo !
Neniu miraklo !
Pigreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj

### Okaze de kvereloj inter infanoj

Kiu ordonis al vi frapi lin/ŝin ?
Kial vi tiel miskondutis ?
Ĉu vi ne scias ke tio estas malrespekto al via kamarado ?
Estas maldece kvereli kun amiko
Regu vin, ĉio ne nepre plaĉus al vi
Mi ne toleras ke vi kvereliĝas
Estu tolerema, li estas malpli granda/aĝa ol vi
Viro ne devas frapi virinon
Vi pardonu lin kaj vi kisu unu la alian kiel signo de paciĝo
Vi ambaŭ estas fratoj, do kial vi ĉiam kvereliĝas ?

Sufiĉe !
Panjo ne eltenas vian stultan kverelon
Estu paco inter vi !
Ĉesu infanaĵojn !
Kiu la unua miskondutos, tiun mi tuj punos
Kial mi devas elteni vian stultaĵon ?
Mi ne plu arbitracios vian aferaĉon
Ĉesu plendi antaŭ via patrino pri viaj stultaĵoj
Prenu sur vin la rezulton de via kulpo

### Ricevinte poŝtaĵon

Jen letero por vi el via amikino en Rusio
Ĉu la poŝtisto alportis ion por vi hodiaŭ ?
De kiu vi ricevis tiun poŝtaĵon ?
Kies leteroj kuŝas sur la tablo ?
Ĉu via estas tiu bunta poŝtkarto ?
Admiru la belegan poŝtmarkon sur la koverto

## 3. Familiaj festoj kaj donacoj

### Naskiĝtago

Gratulu avon pro lia hodiaŭa naskiĝtago
Diru “Feliĉan naskiĝtagon al  vi, amata panjo !”
Ĉu vi jam kisis vian fraton, hodiaŭ estas lia naskidatreveno ?
Kiun donacon vi deziras por via naskiĝtago ?

Ĉu vi ŝatas ke ni faru belegan kukon por la naskiĝtago de via avino ?
Preparu donaceton por via amiko pro lia naskiĝdatreveno

## Nuptofesto

Panjo preparas viajn vestaĵojn por la nuptofesto de via fratino
Ankaŭ vi estas invitita al la nuptofesto de nia najbaro, do estu saĝa ĉetable
Admiru la belegan robon de la novedzino ! Ĉu ankaŭ vi volas esti tia kiam vi edziniĝos ?
Estu koketa ĉar hodiaŭ estas grava tago pro la nupto de via frato

## Kristanaj festoj

### -kristnasko:

Diru “Feliĉan kristnaskon !” al niaj gastoj
Ĉu ankaŭ vi ŝatas ĉeesti teatraĵon pri la sankta naskiĝo en la preĝejo ?
Se vi deziras akompani panjon al la preĝejo dum kristnasko, preparu vin tuje

### -paskofesto:

Al ĉiuj vi povas bondeziri feliĉan paskofeston
Lernu bondeziri pri pasko, ne hontu
Ĉu vi scias kial ni festas paskon ?

## Panjofesto

Ni kisos panjon pro la panjofesto
Diru “Feliĉan feston al vi, mia unika kaj amata panjo !”
Kion vi donacos al panjo okaze de la patrina festo ?
Tiel vi diru ofertante la donacon al ŝi “Mi amegas vin, mian belan patrinon !”
Panjo estos feliĉa se vi tiel diras al ŝi “Mia plej bela donaco por vi estas mia koro kaj mia amo, mia karega patrino !”

## Paĉjofesto

Telefonu al via patro kaj diru “Feliĉan paĉjofeston al vi, mia amata paĉjo !”
Ĉu vi scias kio estas la plej bela donaco por paĉjo ? Ke vi estu saĝa kaj diligenta en via lernado

## Nova jaro

Al ĉiuj homoj ni bondeziru “Feliĉan novjaron !”
Ĉu vi scias kiel respondi al novjaran bondeziron far aliaj homoj ? “La samon mi bondeziras ankaŭ al vi !”
Estas ja kutimo bondeziri ion al homoj okaze de la nova jaro

### Aliaj festoj

Hodiaŭ estas la festo de xxxxxxxxxxx, ĉu vi deziras partopreni ĝin kun via frato ?
Preparu vin, ni ĉiuj iras al la festo de xxxxxxxxxxx,
Se plaĉas al vi ĉeesti la xxxxxxxxxxxx, diru tion al via patrino

### Familiaj renkontiĝoj kaj rilato kun familianoj kaj parencanoj

Ĉu vi jam scias ke geavoj partoprenos nian venontan familian kunvenon ?
Mi ĝojas anonci al vi ke nia kara Onklo xxxxxx venos de Japanio por ĉeesti la nuptofeston de xxxxxxx

Ĝoju ĉar venos al nia hejmo ĉiuj viaj gekuzoj, vi rajtas ludi kune en la ĝardeno
Dum la granda familia renkontiĝo, mi organizos danc-konkurson inter la infanoj, la plej bona ricevos premion
Pripensu de nun kiun donacon vi ofertos al la familianoj dum la interŝanĝo de donacoj

## 4. Feriumi

### Prepari la feriojn

Laŭ via opinio, kie ni ferios venontfoje ?
Ĉu plaĉas al vi se ni ferios en xxxxxxx ĉi-monate ?
Ni ne plu ferios en montaro ĉar mi konstatis ke vi ne tro ŝatis tion
Ĉi-jare, ni havas tri eblecojn : la maron, la montaron, la savanon de Afriko. Kiun vi preferas ?
Helpu panjon prepari viajn valizojn
Vi rajtas kunporti viajn ludilojn sed vi mem prizorgu pri kien vi metos ilin
Mi avertas vin, la manĝaĵoj tie estas iom malsamaj ol ni kutime manĝas tie ĉi
Ofte pluvetas matene en tiu feriejo, do ne forgesu enpaki viajn pluvmantelojn
Temas pri tute alia kulturo, kiun ankaŭ ni devas respekti
Vi rajtas elspezi viajn poŝmonojn laŭ via plaĉo ĉar vi mem ilin ŝparis dum monatoj

### Survoje al la ferioj

Ne dormu dumvoje, profitu la okazon por rigardi la naturon
Ni preterpasas nun la plej riĉan naturrezervon de la regiono
Admiru tiun lagon, baldaŭ ni alproksimiĝos al ĝi kaj ĝin preterveturos

Karulineto, iru malantaŭe por sidi apud panjo, vi ne rajtas resti tie ĉi
Panjo metos suĉumon al viaj buŝoj se vi ne trankviliĝas
Prenu la suĉbotelon de via frateto el tiu nigra sako kaj donu ĝin al panjo
Ni baldaŭ alvenos en iu restoracio, preparu vin por tagmanĝi
Mi petas, ne bruegu ĉar mi bezonas pli atenti pri la vojo
Rigardu kiom rapida estas tiu kapreolo ! Ĉu vi vidas ?
Vi rajtas aŭskulti muzikon aŭ ludi per via  komputilo tamen ne mistrafu tiun belegan pejzaĝon

Karulo mia, kiom restas laŭ la kilometrofosto ?
Ĉu vi kapablas legi la nomon de la urbeto ?
Se vi estas laca, diru tion kaj mi tuj haltos
Etulo, vi daŭre ploras, venu al paĉjo por ke mi luletu vin
Panjo ja lacas en la aŭto, nun pacjo brakportos vin dumpauze
Mankas al ni tempo por halti ĉe restoracio, panjo jam kunportis manĝaĵojn
Ne hezitu trinki tiom multe da akvo kiom vi soifas
Rigardu, via fratino ne eltenas la vojaĝon, feliĉe ke panjo jam kunportis medikamenton

Jam noktas, provu ekdormi laŭeble
Ne timu, nenio okazas se vi dormas survoje
Tuj kiam ni renkontos hotelon, ni eniros tien por dormi

## En feriejo/hotelo : en la montaro/skiejo/marbordo/kamparo…

Ni pasigos xxxxx tagojn tie ĉi, enestiĝu vi kiel eble plej komforte
Vi ambaŭ disdividos la saman dormoĉambron
Ĉio estas en ordo, vi povas dormi tute trankvile
Ĉiumatene, ni nur matenmanĝos tie ĉi sed por la ceteraj manĝoj, ni iros aliloken

Ni troviĝas en alta montaro, nepras atenti pri ĉiu moviĝo
Ĉiumatene nebulas tie ĉi kaj vi devas ŝirmi vian kapon
Se vi ŝatas promeni, eblas lui ĉevalon por rajdi

Kiu deziras esti fotita kun la skiilaro ?
Atentu ! Glitglategas la neĝo
Venu por ke mi montru al vi kiel starigi dumskie
Ne ridu se li falis, mankas al li sperto

Daŭre malvarmas la maro, ni iom atendu
Ne hastu eniĝi en la maron sen via banvesto
Ni kune faros pilkoludon en la maro
Paĉjo instruos al vi kiel naĝi en la maro
Ne timu la tajdon, eblas ludi kun ĝi
La maro ŝaŭmas ĉar ĝi forte moviĝas
Estas malpermesite naĝi en tiu areo

Spertu la varmecon de la sablo
Helpu min skulpti katon per la sablo
Rigardu la aliajn infanojn, ili konstruas belan kastelon per la sablo
Sablo tie ĉi ne estas malpura, vi rajtas ludi ĝin
Mi eniĝas en la sablon, tio estas bona por la sano

Venu apud mi por sunumi
Ĉu vi ne volas ripozi sub la ombrelo ?
Panjo sternis tolaĵon sur kiu vi povas kusiĝi
Post la naĝado, vi povas aŭ legi aŭ dormi sub la sunombrelo
Iru al via patrino por trinki iom da fruktosuko, ja varmas nun
Estas tro multe da naĝemuloj en tiu ĉi strando, ni iru iom for

Ne miru se la kokkanto vekos vin morgaŭ  matene
Ni promenos tra la kampoj kaj vizitos kelkajn fermobienojn
Vi vidos multajn bestojn vivantajn, ne nur bildajn kiel kutime
Spiru la puran aeron de la kamparo kaj ĝuu la belan sunon
Sen akompano far plenaĝuloj, vi ne rajtas naĝi en tiu rivero/lago
Jen kiel kamparanoj laboras sian grundon
Tiu sovaĝa floro pikas kaj povas vundi vin
Estas malpermesite alproksimiĝi al tiu ravino
Saluti nekonaton estas tradicio de kamparanoj tie ĉi, do ne miru pri tio
Atentu, ne poluu la medion, ĉiam kunportu viajn rubaĵojn kun vi
Manĝaĵoj en la kamparo estas pli natura, freŝa kaj sana
Ĉu vin tentas manĝi la lokajn tradiciajn pladojn ?
Estas normale ke koto makulas vian kalsonon, ni estas en kamparo

## 5. Akcepti iun en la stacidomo/flughaveno

### Bonvenigi iun

Ni akceptos vian avon en la flughaveno, bonvenigu lin per « Estu bonvena inter ni, kara avĉjo ! »
Kiel bonveniĝi ŝin ? Nu,  diru « Bonvenon kara avino ! »
Diru tutsimple « Ni ĝojas revidi vin, bonvenon en nia lando ! »
Vi estas nun sufiĉe granda, vi povas bonvenigi ŝin per « Bonvenon sinjorino, kia estis la vojaĝo ? »

### Traduki ies parolojn

Ĉu vi volas scii kion li volis diri ? Mi tradukas : ……….
Diru ion al li kaj mi tuj tradukos
Li volis diri ke ……………..
Mi ne sufiĉe bone komprenis lian diron
Ŝi diris ion en lingvo nekomprenata de mi
Li faras  surd-mutan lingvaĵon

## 6. Hejma aktivaĵo

### Instigi la infanon al kreado :

#### kanti

Karulineto, kantu al mi nian kanzonon xxxxxxxxxx. Bonege !
Se vi kapablas kanti same bone kiel ŝi, mi rekompencos vin
Kantu milde la lulkanton por dormigi vian franjon
Rigardu kiel ŝi kantas kaj imitu kiel ŝi faras
Kantu xxxxxx, via bela voĉo fascinas min
Per tiu karaokeo, vi lernos kanti. Brave ! Vi estas sur la bona vojo !
Kantu kun ŝi xxxxxxx, vi ambaŭ formas bonegan dueton

## desegni

Imitu tiun desegnon
Montru al mi kion vi desegnas hodiaŭ. Gratulon ! La desegnaĵo estas bela !
Jen estas programo por desegni helpite de komputilo, mi instruos al vi kiel fari
Ĉiu infano kapablas desegni sian revon
Kion vi desegnos pri Kristnasko ?
Kia desegno ! Vi estas vera artisto, mia kara
Faru desegnaĵon pri via lernejo kaj sendu ĝin al via korespondanto en Afriko
Ĉu tiel malbele aspektas nia poŝtisto ? Eble vi iom troigis !
Kompreneble jes, vi rajtas afiŝi en via ĉambro viajn plej belajn desegnaĵojn
Desegnu sur la poŝtkarton kaj sendu ĝin kun novjara bondeziro al via onklino

## danci

Montru al via kuzo kiel vi dancas Michael Jackson-on
Vi diris ke vi kapablas fari dancon de Brazilano ?
Vi ja kapablas movi la postaĵon kiel Afrikanoj
Bone rigardu la videon kaj imitu tutsimple tion, kion ŝi faras
Ĉu vi ne deziras partopreni la danc-konkurso en via lernejo ? Do, preparu vin bone
Kiun dancon vi deziras praktiki : ĉu klasikan, modernan aŭ iun alian ?

## paroli, vortumi

Hej, ŝi kapablas prononci bone la vorton « Ne ! »
Diru « panjo », « panjo », « panjo »
Kiam vi ricevis ion de iu, diru « Dankon ! »
Pli laŭte kiam vi parolas
Trezoro, montru al mi ke vi scipovas prononci « paĉjo ». Vi ĉiuj, gratulu ŝin !
Kiu estas en tiu ĉi foto ? Jes, brave !
Kio ĝi estas ? Ĝi estas koko. Koko. Koko
Iru kaj voku panjon
Diru al paĉjo ke mi bezonas lin
Flustru al paĉjo kiu li estas

## gesti

Rigardu kiel mi faras/moviĝas
Mi supren levas la du manojn, faru la samon
Kiel li klinis sian kapon, ĉu tiel aŭ tiel ?
Premu tiel la butonon por ŝalti la komputilon
Vi faru tiel por eniri en tiun lokon

## mimi

Tiel mi mimas la vizaĝon de la katino. Miaŭ ! Miaŭ !
Ne mimu la irmanieron de via avino, ŝi facile ofendiĝas
Kiu kapablas mimi la voĉon de la blekanta ŝafo ?
Kiel voĉas la kato kiam ĝi malsatas ?

priskribi

Kia estas la flago de nia lando ? Kaj tiu de Rusio ? Kaj tiu de Malagasio ?
Ronda kia ĝi estas ? Ĉu tia aŭ tia ?
Diru al mi kia aspektas via kalkulileto, ĉi tie estas tiom da ili
Ĉu plaĉas al vi longa kaj blua zono por tiu robo ?
Kiajn tipojn de kartoneto petis via instruistino ?
Kio estas la diferenco inter kato kaj leono ?

lerni sian lecionon…

Finu vian lernotaskon antaŭ ol ludi
Vi faros tiun ekzercon, kiun mi kontrolos pli poste
Se vi sukcesos solvi tiun problemon, mi rekompencos vin per glaciaĵo
Promesu ke vi bone laboros dum mia foresto
Hej, restas farendaj tri ekzercoj !
Se mi estus je via loko, mi tuj lernus tiun ĉi lecionon
Se vi bezonas konsilon, mi estas preta kontroli la ĵus lernitan lecionon
Ĉu vi jam finlernis ĉion ? Do, kial resti antaŭ la televidilo ?
Eĉ via eta frato kapablas fari tiun hejmtaskon, ĉu vi ne hontas ?
Mi ĵus kontrolis ĉiujn viajn kajerojn, vi faris tri novajn lecionojn hodiaŭ
Mi helpos vin, ripetu al mi laŭte vian recitaĵon
Klarigu al mi kial oni diras en via geografia leciono ke ………………….

rakonti

Rakontu al mi kion vi vidis dum la spektaklo
Rakontu al paĉjo kiu vizitis nin hodiaŭ matene
Via patrino volas aŭdi la fabelon pri la kato kaj la muso
Ĉu plaĉas al vi ke mi rakontu ion pri ………………. ?
Malfermu bone viajn orelojn, jen estas interesa fabelo pri ……………
Estas via vico rakonti al mi la fabelon de ……………. Mi pretas aŭskulti
Ĉu vi ŝatas ludi kun mi ? Ni kreos fabelon. Mi komencas ĝin kaj vi, laŭvice daŭrigas la fabelon ĝis la fino. Bone, se vi estas pretaj. Do, iun tagon, la Suno diris al la homoj sur la Tero : « Mi estas laca lumigi vin en ĉiu tago, mi intencas forlasi vin ». … Nun, estas via vico daŭrigi………………..

difini ion

Ĉu vi scias kio estas papilio ?
Kion signifas « saĝa knabo », laŭ vi ?
En via leciono, kiel la instruistino difinis ………….. ?

Kuraĝigi

Kuraĝe !
Estu kuraĝa !
Mi kuraĝigas vin, xxxxxxxx
Panjo kaj mi ĉiam apogas vin, ne timu

Ni pretas subteni vin en via klopodo
Ne timu, vi jam travivis pli malfacilan situacion ol tiu ĉi
Rigardu, ĉiuj viaj gekuzoj ĉeestas nur por vi !
Iru tien, paĉjo restas tie ĉi por rigardi vin ludanta
Kial timi, doktoro ne nepre injektas vin
Tre bone, trezoro ! Vi ludas kiel ĉampionulo !
Kvankam vi estas etstatura, tio ne signifas ke vi estas malkapabla

### Admoni, riproĉi

Ĉu mi ne jam avertis vin pri tio ĉio sed vi ne aŭskultis min ?
Jen fiaĵo okazas kiam oni aŭskultas neniun
Se vi ne estus irinta tien, nenio el tio okazus
Paĉjo kaj panjo bezonas saĝan infanon, vi ne inde sintenis
Viaj gepatroj hontas pro via malafabla sinteno
Kion vi faros nun ? Neniu krom vi mem povas ripari vian eraron
Kiun vi volas riproĉi pro tiu situacio ?
Ĉar vi malemis lerni viajn lecionojn, tiel estas la rezulto
Mi ne povas helpi vin, elturniĝu !
Antaŭe vi ne aŭskultis min kaj nun vi petas helpon ?
Ĉiu homo respondecas pri sia propra ago

### Korekti misvortumon, misprononcon

Kial vi ĉiam erare diras « eletron » ? Diru « e-lek-tron »
Ne tiel oni prononcas ŝian nomon sed tiel : « Ka-ta-ri-na »
Diru « biciklo » anstataŭ « viciklo »
Vi erare miksas « salti » kaj « ŝalti ». Rigardu, nia kato saltas sur la tablon kaj nun, mi ŝaltas la lumon

## 7. Esprimi senton

### Miri

Nekredeble, vi sukcesas trapasi tian obstaklon !
Mi neniam pensis ke iutage, vi kapablos naĝi
Ĉu via eta frato faris tiun ĉi belan desegnaĵon ?
Kia bela robo ! Ĝi tute taŭgas al vi !
Ha, kiom bonodoras la plado far panjo ! Ĉu malvere ?
Sed kio okazis ? Kial tiom da bruo ?
Tio ĉi estas pli ol surprizo !
Mirinde, milfoje mirinde !
Nepensebla, neantaŭvidebla ŝanĝiĝo de l’afero !

### Bedaŭri

Mia karulineto, mi bedaŭras mistrafi lin
Bedaŭrinde, mankas al ni tempo por viziti lin
Ankaŭ al mi doloras la koro sed li estis ege maljuna kaj iam li devas morti

Mi komprenas vian doloron sed tiel estas la vivo
Tiel same kiel vi mi frustras sed kion fari ? Li mem decidas pri sia vivo
Nenion ni povas fari

## Grumbli

Kion vi faris kun tiu knabaĉo dum tiom longatempo ?
Kiom da fojo mi malpermesis al vi ne skribi sur la muron ?
Horojn mi atendis ke vi alportu al mi la cindrujon !
Ĉu ne eblas silentigi la ploradon de via eta frato ?
Vi absolute ne plu rajtas eliri de ĉi tie !

## Petoli

Venu, rajdu sur mi, mi estas ĉevalo kaj vi la rajdanto
Ni kuŝiĝu sur la tapiŝo, ni faros kiel soldatoj pafantaj
Ni boksu unu la alian, vi estu mia kontraŭulo
Mi metas maskon sur mia vizaĝo, mi muĝas kiel leono. Mi ekmanĝoooooooooos viiiiiiiiinnnnn ! Ne forkuru ! Mi nepre kaptos vin !

## Ŝerci

Postmorgaŭ, ni ĉiuj kune iros al xxxx por aĉeti novan aŭton, Jes, ne kredu min, mi nur ŝercas !!!
Hodiaŭ estas la naskiĝtago de panjo. Kompreneble, mi ne estas serioza dirinte tion
Se ĉiu bonege laboras en la lernejo, vi rajtas promeni en la parkon dimanĉe. Ĉu mi mensogas ? Jes, miaj karuloj, mi mensogas por inciteti vin. Estas vere ke, dum unu monato, la parko estas fermita pro speciala laboro
Kiu deziras la kutiman freŝan glaciaĵon ? Ĉiuj ? Nu, mi bedaŭras sed la butiko jam translokiĝis de unu semajno
Ne koleru, tio estas nur ŝerco por ridi

## Koleri

Kiu ĵus malobeis al mia ordono ? Ha, tiu spertos mian koleron !
Kiom da fojo mi jam ripetis ke vi ne nepre ludu for de la korto ?
Kial vi tretas sur ies piedojn, ĉu vi estas miopaj ?
Kiu intence furzetis antaŭ la gastoj, tiu revenu tuj en la salono !
Ne, ne, ne, absssssolute ne, vi ne rajtas akompani lin, alie, …………….
Diru al mi, kiu el inter vi fie agis en la dormoĉambro ? Rapidiĝu ! Alie, vi ĉiuj estos punitaj

## Vei

Ve !
Ho ve !

## Honti

Mi hontas
Kia honto !
Eble vi ne scias kiom mi hontis antaŭ la instruistino
Mi ne plu kuraĝis rigardi la najbarojn
Ĉiuj okuloj rigardis al mia direkto, mi ŝvitis
Ruĝiĝis miaj vangoj

« Relative tolereblaj » nedecaj vortoj (sakraĵo, blasfemo, triviala vorto…) far gepatroj antaŭ la geinfanoj okaze de kolero aŭ surprizo

Fek !
Merdon !
Fekaĵo !
Fekulo
Aĉulo
Ulaĉo
Fiulo
Fiaĉulo
Neindulo
Sentaŭgulo
Senhontulo
Krimulo
Drogaĉulo
Ebriemulo
Fiaĉulo
Stultulo
Mensmalsanulo
Frenezulo
Poltrono
Besto
Azeno
Hundo
Lupo
Porko
Bovo
Krudulo
Kavernulo
Praulo
Kruelulo
Perfortemulo
Kovardulo
Fiavarulo
Dio mia !
Kristo Jesuo !
Fulmotondro !
Diable !
Damne !
Damnito !

Faŝisto !
Naziisto !
Rasisto
Ksenofobo !
Sklavigisto !
Teroristo !
Hipokritulo !
Egoisto !
Demagogo !
Flatemulo !
Putro !
Kanajlo !
Sendanka !
Di-maltima !
Malhonesta !
Pigra !
Sovaĝa !
Besteca !
Koruptita ĝis la osto !

## 8. Io okazanta surstrate/en publika loko/en veturilo (aparte en komercaj lokoj)

Surstrate, en publika loko :

Ne ĉiam turnu la kapon, rigardu vian vojon
Hastu, ne haltu en ĉiu angulo de la strato
Atentu tiun flakon ! Viaj ŝu-paro humidiĝos
Rigardu bone kien vi paŝas
Ĉiam tenu mian manon por ne perdiĝi/erarvoji
Ne ploru, ĉiuj rigardas nin kvazaŭ mi estus ŝtelisto de infanoj
Atendu min antaŭ tiu butiko, mi nur kontrolos ĉu via patrino estas ene

En veturilo :

Ne bruaĉu kiam mi stiras
Ne forgesu meti la sekurec-zonon
Vi estas tro eta, vi ne rajtas sidi apud la stiranto
Vi rajtas malfermi la vitron de la fenestro por aerumi
Iom malhelas kiam ni trairas tunelon, ne timu
Ne alĵetu tra la fenestro viajn rubaĵojn

Ĉiu okupiĝu pri sia ludilo por eviti kvereladon
Vi nervozigas min, kial vi volas pisi ĉiun kvinan minuton ?
Vi restu en la aŭto sed atentu, vi nepre ne tuŝu al io ajn tie ĉi. Tio estas danĝera

En komerca loko :

Kion vi ŝatas ke mi aĉetu por vi ?
Ĉu tio ĉi plaĉas al vi ?
Ĉu pri tiu xxxxxx vi priparolis al mi hejme hieraŭ ?
Ne tro postulu, mi petas. Mi ne havas tian monon
Rigardu kaj elektu kiun plaĉas al vi. Hodiaŭ estas ja granda tago por vi
Ne malpaciencu, ni devas viciĝi antaŭ la kaso same kiel tiuj aliaj uloj
Vi volas puŝi la ĉareton ? Jen ĝi, prenu
Decidu vi ĉar ni ne plu havas tempon
Atentu, estas malpermesite malpaki surloke tiun ĉokoladon
Rigardu kie situas la bretaro pri lernilaro
Ne insistu kunporti tiun pezan botelon, enmetu ĝin en la ĉareton
Ambaŭ fromaĝoj havas la saman guston tamen tiu ĉi tro multekostas. Ne valoras ĝin aĉeti
Hodiaŭ, la supermerkato ofertas specialan tarifon por infanoj, ni hastu por ne mistrafi ĝin
Ni mistrafas la xxxx, la bretaro estas jam malplena
Ni ĉirkaŭas la bretaron pri parfumo por vidi kio novas ?

## 9. Kun la dom-bestoj

Prizogu kaj dorlotu bone vian kateton, alie ĝi eskapos
Vi mem prizorgu pri la manĝaĵo kaj la purigado de viaj bestetoj
Eduku vian hundeton ne feki ie ajn
Kontrolu ofte ĉu via besto vundiĝis
Ne, ni ne plu rajtas aldoni aliajn bestojn tie ĉi, ni devas redoni ĝin al la socia servo
Mi bedaŭras sed via hundo estas malsana, tial ĝi ne plu kapablas manĝi
Momenton, ni vizitos bestkuraciston morgaŭ matene
Ne ploru, ni faros ĉion eblan por savi la katineton

Ludu kun via kato kaj hundo en la ĝardeno
Karesu vian kateton, ĝi sentis ke vi malĉeestis dum unu semajno
Montru al via hundo kiel ludi pilkon
Ne timu, tiu hundo estas tre afabla, ĝi bezonas amikon kiel vin
Kompreneble, viaj hundoj akompanos nin en la feriumado
Ne eblas kunporti tiujn katojn en la marbordo, ni klopodas trovi iun por okupiĝi pri ili

Vi ne rajtas malbone trakti tiun beston kvankam ĝi estas malpura kaj malbela
Ne perfortu  beston, tio ne indas
Hundo estas inteligenta besto kaj fidela amiko de homoj. Ĝi kapablas gvidi blindulojn kaj eĉ savi homojn el danĝero

Se vi diligentas nutri tiun enkaĝan birdeton, mi aĉetos ĝin por vi
Ne miru, ankaŭ besto naskiĝas kaj naskas idojn, grandiĝas, maljuniĝas kaj mortas same kiel ni homoj

Aŭskultu la voĉon de la kato, ĝi miaŭas (*eblas aldoni etan liston de voĉo/krio de dombestoj)

Kial via hundo ĝemas, kontrolu kio okazis al ĝi, eble ĝi suferas
Ne alproksimiĝu al tiu ĵus akirita hundo, ĝi povas mordi vin

Ne, ne eblas al ni gastigi ĉiujn senhejmajn hundojn kaj katojn !
Mi scias ke vi ŝategas bestojn sed vi ne dormu kun ili ĉelite, tio povas kaŭzi malsanon al vi
Krom kato kaj hundo, mi ne volas ke vi akceptos aliajn bestojn

## 10.Rigardi spektaklon/ĉeesti matĉon

Unue, ni aĉetu biletojn ĉe la giĉeto kaj poste vicatendas
Se ankaŭ vi ŝatas la bandon xxxxxx, ni kune spektos ĝian spektaklon
Vi ne povas vidi, do mi surŝultras vin
Mankas sidloko, venu sur miajn femurojn
Aplaŭdu ! Aplaŭdu ilin !
Mi seniluziiĝas, la spektaklo ne valoras, ni eliru tuj
Ne miru se antaŭ la projekciado, mallumegas en la kinejo
Se vi volas krokmaĉi ion, estas moviĝanta vendisto en la kinejo
Ĉar vi insistis spekti tiun filmon, tenu firme mian manon se iu sceno timigas vin

Ĉu vi ŝatas la etoson en la stadiono ?
Kiun futbaliston vi la plej ŝatas ?
Kion vi diris ? Nenion mi aŭdis pro la bruego !
Vi tro entuziasmiĝas ! Rigardu, vi ŝvitas kaj via voĉo ekraŭkas
Ne estu trista, nia teamo perdis sed ĝi venkos venontfoje
Vi soifas ? Ni aĉetos glaciaĵon pliposte
Ne plendu, tio estas normala kiam la stadiono estas plenplena
La arbitracianto estis maljusta, li inklinis al tiu teamo
Ĝi estas nia teamo, do ni ĉiam subtenas ĝin
Mi timas la fi-reagon de la spektantoj, ni ne atendu la finon de la matĉo

## 11. Enveni restoracion

Ĉu ankaŭ vi kapablas legi la menuon ?
Kion ni mendas ?
Ĉi tie ili ne servas sandviĉon !
Ĉu ni eniru tiun tajlandan restoracion ?
Se vi bezonas ion, ni povas voki la kelneron
Estu pacienca, restoracio ne tuj servas ĉar ili devas prepari ĉiujn pladojn
Prenu  el la pladoj tiom, kiom vi kapablas digesti
Tiu ĉi supo estas tro granda/spica por vi, ni elektu iun alian tipon
Tro grasa estas ilia fritita terpomo, ni redonu ĝin al la kelnero
Ĉu vi scias pri kio temas tiu xxxxx ? Tiu estas ne el kokinaĵo kiel faris panjo hejme sed el ŝafaĵo
Ĉu bongustis tiu ĵus manĝita plado ? Kial vi malŝatas ĝin ?
Vi volas pisi ? Iru al tiu angulo, tie estas la necesejo
Vi jam mendis tiun ĉi pladon, ni ne plu povas ŝanĝi ĝin

Vi apenaŭ ekmanĝetis tiun ĉi pladon ?
Ha rigardu ! Vi tutfinis vian pladon ! Vi ja havas bonan apetiton hodiaŭ ?
Vi metis tro da salo en vian supon, ĝi ne plu estas glutebla

## 12. Pri ĉio rilate la lernejon

### La instruistino

Kiel nomiĝas via nova instruistino ?
Ĉu si estas afabla ?
Kia ŝi estas ? Juna aŭ maljuna ? Kiom ŝi aĝas ?
Kion ŝi diris al vi ĉiuj ?
Ĉu ŝi rekonis vin ?/Ĉu ŝi scias ke vi estas mia filino ?
Ĉu via instruistino diris ke ankaŭ ŝi havas geinfanojn ?
Ĉu via instruistino klarigis al vi kial ŝi ne laboris hieraŭ ?
Vi havas du instruistinojn en la klasĉambron ? Kion faras unu kaj kion faras la alia ?

Aŭskultu bone kion la instruistino diris al vi
Ne timu ŝin, ŝi ne manĝos vin
Ne, via instruistino estas ne malfabla sed nur severa kaj postulema. Ŝi ne ŝatas lernantojn, kiuj pigras kaj oscedas
Ĉu via instruistino vere diris tion ? Ne, mi ne kredas tion ! Eble vi miskomprenis ŝin
Vi persistas diri ke via instruistino instruis al vi pri tio, ke 2 x 7 estas 16. Tamen tio estas eraro ! Kaj vi ne volas kredi min
Ne hezitu demandi al via instruistino tuj kiam ion vi ne komprenis en via leciono
Hodiaŭ estas la naskiĝdato de via instruistino, preparu iun donacon por ŝi
Kial vi diras ke vi malŝatas vian instruistinon ?
Mi jam diris al via instruistino ke se vi estas malsaĝa en la lernejo, ŝi rajtas puni vin
Ĉu estas vere ke via instruistino jam vojaĝis en Afriko ? Kion ŝi rakontis al vi pri tio ?
Ŝajnas ke via instruistino bone kantas ? Ĉu ŝi ankaŭ instruas tion al vi ?
Diru nur al via instruistino ke vi malsanis hieraŭ
Instruistino estas kiel panjo, vi povas konfidi al ŝi vian problemon
Ĉu via instruistino vere frapis vian brakon per bastoneto ? Ĉu tio estas la kaŭzo de tiu kontuzo ?
Ne mensogu ! Via instruistino ne povas diri tian sensencaĵon !
Ne ploru ! Mi vidos vian instruistinon morgaŭ kaj mi aranĝos tiun aferon kun ŝi

### La kamaradoj

Kiel nomiĝas tiu lernanto, kiu sidas apud vi en la klasĉambro ?
Kiom da gelernantoj estas en via klaso ?
Kiu estas via plej fidela amikino en via lernejo ?
Ĉu tiu kamarado via vivas sen gepatroj ?
Atentu ! Vi kaj  via kamarado kunlaboras por fari fiaĵon
Via amiko ekfumas cigaredon ? Mi konsilas vin, foriru de li !
Jes, ankaŭ via kamaradino povas klarigi al vi se io ne estas klara
Ne ploru, estas granda malfeliĉo ke via amikino perdis sian patrinon
Kial vi surkapigis la kaskedon de via kamarado ?
Ĉu tiu mp3 apartenas al via amiko ?

Vi ne rajtas aĉeti aĵon de via amiko, liaj gepatroj povus ofendiĝi
Bone, kun la samklasanoj, vi povas viziti vian kamaradon en la hospitalo
Vi absolute ne rajtas kopii el la testfolio de via amiko, tio estas malhonesta

Ĉiam helpu vian lamantan kamaradon ĉe la ŝtuparo
Ne timu lin kvankam li estas nigrahaŭta

## La lernilaro

Kiom da kajeroj vi havas entute ?
Ne uzu verdan skribilon por kopii la tekston, tio dolorigos viajn okulojn
Vi tro emas gumi, rigardu, estas tro da makuloj en via kajero
Kial ĉiutage mi devas aĉeti novan skribilon por vi ?
Ne forportu hejmen la ajon de via kamarado
Ĉu ankaŭ via kamarado havas dek gumojn ? Ĉu vere ?

## La taskoj kaj hejmtaskoj

Montru al paĉjo ĉu ne estas hejmtasko hodiaŭ
Ne forgesu montri al mi la subskribendan kajeron
Lerni la lecionojn estas via tasko, mi ne povas fari tion je via loko
Ankaŭ purigi la klasĉambron estas tasko de la gelernantoj
Kion vi lernas en via lernejo ?
Ĉu vi neniam lernas pri higieno ? Kial via mano estas tiel malpura ?
Diru al via instruistino ke vi nenion komprenis pri tiu hejmtasko
Provu unue. Se vi malsukcesas, mi povos helpi. Sed provu !
Vi tro malpaciencas. Pripensu bone antaŭ ol skribi
3 x 6 estas facila, vi ne bezonas skribi. Sufiĉas mensa kalkulo !

## La lernejaj eventoj/festoj

Panjo jam preparis vian kostumon  por la karnavalo
Kiun rolon vi ludos en tiu eta teatraĵo ?
Sed mi neniam vidis vin danci ? Tio surprizas min !
Ne  perdu tempon pri hararfrizado, ni  riskas  mistrafi la komenciĝon
Ĉu ankaŭ la gepatroj estas invititaj ? Kial vi ne diris tion plifrue ?
Kion vi devas kunporti en tiu ekskurso ?
Sandaloj ne taŭgas se vi vizitos naturan parkon, eble vi devas surmeti boto-paron

Brave !  Mi fieras pro tio, ke vi bonege kantis
Kial vi ploris meze de viaj  kamaradoj ?  Kion vi  timis ?
Vi neniam rigardis al  ni, ni provis mansigni al vi.  Ĉu vi ne ekvidis tion ?
Mi provis voki vin sed  la bruo malhelpis
Via kravato  malbone lokiĝis dum la spektaklo
Vi facile hontas antaŭ la publiko
Iru tien ! Rigardu, viaj samklasanoj jam estas sur la sceno
Mi filmis vin, tio estas bela memoraĵo por vi kiam vi estos granda

Prepari la ĉiutagan aliron al la lernejo

Karulineto, estas temp'  por vekiĝi
Post la manĝo,  vi vestu vin rapide
Ĉiam kontrolu ĉu ĉio necesa jam estas en via tornistro
Mi kondukos vin al la lernejo sed xxxxx prenos vin de tie  je la 11a
Hodiaŭ  estas mardo, ĉu vi ne gimnastikas ?
Vi havas febron, mi preferas ne sendi vin lernejen hodiaŭ
Mi ĵus telefonis al la direktorino, ŝi diris ke ne okazos  lernado pro la ciklono
Kiun manĝeton vi ŝatas hodiaŭ ? Ne manĝu tro da dolĉaĵo
Kvankam pluvas nun, ni devas iri al la lernejo

## 13. Dum gastado ĉe ies domo

Vi estu saĝa
Ne agu same kiel vi faras en nia hejmo
Vi devas respekti ies domon kaj respekti ankaŭ tiun familion
Niaj gastigantoj kutimas dormi pli frue, do ni respektu la horaron
Atentu ĉar onklino ne toleras ke oni frakasas ŝian vazon
Ne tro postulu de nia avo, li jam sufiĉe multe laboris dum sia junaĝo
Mi ne volas ke iu plendos al mi pro viaj fiagoj
Ne tie ĉi vi montru viajn kapricojn
Antaŭ ol preni ion ajn tie ĉi, nepras ke vi petu la permeson de mi aŭ de panjo

## 14. Vetero, klimato kaj sezonoj

La vetero : vento, temperaturo, suno, nuboj… kaj ties rezulto sur unuopulo

Malvarmas  hodiaŭ, surmetu varman vestaĵon kiam vi eliras
Tro malalta estas la temperaturo, vi riskas malvarmumiĝon
Multe neĝos  morgaŭ laŭ  la meteorologo, ĉu vi jam sufiĉe  prepariĝas pri tio por via morgaŭa programo ?
La suno forte frapas vian  kapon, surmetu  almenaŭ kaskedon
Ege varmas nun, trinku tiom ofte akvon, ne  limonadon sed  akvon
la vetero de hodiaŭ similas al forno, ŝmiru la tutan korpon sub la ombro de tiu arbo
Kia forna vetero ! Mia haŭto bruliĝas
Kia infero ! Mi ŝvitas kiel akvokrano

Fridas la vento, ŝirmu vin  per la kovrilo
La vento forte blovas, protektu viajn orelojn
Tiu vento alportas polvon kaj sablon, vera tempesto. Do atentu viajn okulojn
Vi tremas pro frideco, venu tuj apud mi
Iom grizas hodiaŭ kaj neniu scias ĉu baldaŭ pluvos, avino ne eltenos tiun veteron
Vidu, estas nur kelkaj nuboj en la ĉielo, tio signifas  ke ne pluvos  hodiaŭ
Rapidiĝu ĉar tiu nigra nubego signifas  pluvon
Fulmo ĉiam akompanas tondron. Ne timu !

Ŝtormo okazas nur dum momento. Baldaŭ ni povas eliri
Fulmotondro ne signifas ke Dio koleras. Temas pri tute normala natura fenomeno

Ciklono trairas la insulon, do ni ne rajtas eliri
Pluvetas ĉi-matene, kunportu vian pluvombrelon kaj surmetu vian boto-paron

Kiam okazas tertremo tie ĉi, nepras ke ni ĉiuj eniĝu sub tiun tablon
Okaze de inundo, ni devos forlasi tiun ĉi lokon kaj translokiĝi en xxxxx

### La sezonoj kaj la videblaj/senteblaj ŝanĝoj de la ĉirkaŭaĵoj

#### La printempo

Efloras ĉiuj vegetaĵoj
Sentu la parfumon de la floroj
Vidu kiom bela kaj vivanta estas tiu floro
Jen estas tempo por promeni en la kamparo
Kiom freŝa estas la aero !

#### La aŭtuno

Oftas la pluvo dum tiu ĉi periodo, do ĉiam kunportu vian ombrelon
Atentu truojn sur la vojo, akvo kaŝas ilin
La foli-arbo defalis de la branĉoj kaj amasiĝas en la korto

#### La somero

Ĉiam varmas en somero, do trinku kiel eble plej ofte akvon
Ŝirmu vin kontraŭ la suno
Apenaŭ blovas la vento
Mi kondukos vin al la naĝejo ĉar tro varmas hodiaŭ

#### La vintro

La branĉoj de la arbo eltenas la pezan neĝon
Ne plu eblas ne surmeti sur sin varmajn vestojn
Mi jam reguligis la hejtilon
Restu kun mi apud la kameno, fridegas ekstere

## 15. Ĉe la ĝardeno/parko kaj la mondo de plantaĵoj

Lernu de panjo kiel nomiĝas tiuj belaj floroj en nia ĝardeno
Rigardu bone kiel panjo flegas siajn florojn ĉiutage
Via pilko nepre ne tuŝu la florojn de pajno
Kiu renversis la flor-potojn en la verando ?
Kiujn florojn vi ŝatas ?
Tiuj ĉi plantoj devenas de tre malproksimaj landoj
Tiuj plantoj bezonas insektojn kiel abelojn por vivi

Eble vi ankoraŭ ne kapablas supreniri la branĉojn de tiu arbo, ili tro altas
Ĉu panjo permesis al vi akvumi siajn florpotojn ?
Ankaŭ plantoj vivas, ili bezonas sunan lumon, aeron, akvon kaj foje sterkon, alie ili velkus

Kelkaj plantoj povas esti danĝeraj por infanoj pro ties pikiloj aŭ veneno
Necesas ke ni, homoj, plantu arbojn por protekti la medion
Rigardu tiun planton, jen estas ĝiaj radikoj, la trunko, la branĉetoj kun folioj kaj la floroj
Kial gravas plantoj ? Ĉar ili estas niaj nutraĵoj kaj el ili oni fabrikas medikamentojn por kuraci niajn malsanojn. Kaj per ili panjo ornamas nian korton kaj nian domon

Vidu la avertan tabuleton : « Estas malpermesite surtreti la gazonon »
Ĉu ni sidos sur tiuj benkoj por tagmanĝi ?
Urba orkestro ludos en la parko, ĉu tio interesas vin ?

## 16.Ĉe la mondo de bestoj kaj insektoj

Serpento estas ne dombesto, ni ne rajtas gardi ĝin en la domo
Ne alproksimiĝu al tiuj hundoj kiam ili batalas inter si !
Lernu el la miaŭadoj de la katoj kiam ili malsatas kaj kiam ili volas feki

Elefanto kaj leono ekzistas en Afriko kaj Azio, en nia mondoparto vivas urso
Diru al mi nomojn de besto vivanta en la akvo, sur la arbo, nur en la maro, sur la glacio
En nia regiono, kiuj bestoj vivas en la arbaro ?

Mi ne volas ke vi kaptu tiun papilion, kiom ajn bela ĝi estas
Malbonaj insektoj estas blatoj, ili eniras en la meblojn kaj detruas ilin. Krome, tiuj insektoj alportas kun si malsanojn
Rigardu bone kia aspektas tiu malgranda araneo, kia estas ĝia reto
Ĉu vi jam vidis araneon, kiu kaptis muŝon ĉe la araneaĵo ?
Vermoj utilas al grundo, ili fekundigas ĝin
Timu nek libelon nek akridon, ili ne estas danĝeraj
Oni devas atenti pri abeloj, ili povas piki nin
En malpuraĵo estas multaj mikroboj. Ili restas nevideblaj ĉar ili estas tre tre malgrandaj. Ili vivas en la homoj kaj malsanigas nin
Ĉu vi ne komprenas ke ni bezonas ankaŭ la plej malgrandan beston ? Mezgrandaj bestoj ja manĝas ilin kaj grandaj bestoj nutras sin per tiuj mezgrandaj kaj fine tre grandaj bestoj kiel ŝarkoj manĝas la mezgrandajn kaj la grandajn. Tiel naskiĝas ekvilibro en la Naturo

## 17. Televido

Iru malŝalti la televidilon, la stacio prezentas elsendon por infanoj
Ne restu tro longatempe antaŭ la televidilo
Hej, infanoj ne rajtas rigardi tiun filmon !
Tre interesa estas tiu programo pri natur-protektado
Kion vi ŝatas en tiu elsendo ?
Rigardu kiom lerta estas tiu infano ! Ĉu vi kapablas fari la samon ?
Ankaŭ vi rajtas partopreni tiun elsendon se vi volas kanti antaŭ la publiko
Venu tuj, jen via lernejestrino parolanta en la ĵurnalo !

FIDILALAO Henriel estas instruisto pri la franca lingvo en ŝtata liceo dum deko da jaroj kaj pliposte fariĝas profesia Esperanto-instruisto kadre de la internacia projekto Esperanto Plus. Li plivigligas diversajn klubojn, verkis poemlibron *Duon-ete* kaj romanon *Heroo de l'ĉiutagaĵo* en Esperanto, redaktas sian propran gazeton *Panoramo de la Granda Insulo* en tiu lingvo kaj okupiĝas pri produktado de Esperanto-podkastoj por sia retradio *Aminda Radio Esperanto*. Henriel pasiiĝas pri Esperanto-edukado kaj opinias ke ja necesas eduki infanojn ne nur regi nian lingvon sed ankaŭ tuj utiligi ĝin en rilato kun aliaj/alilandaj samaĝuloj. Tial li instigis iujn el siaj Esperanto-lernantinoj ekinstrui la zamenhofan lingvon al kelkaj infanoj. La nuna verkaĵo iel helpos ilin en tiu edukado.



©Kopirajto Memeldono Antananarivo 2020

La foto sur la kovrilo estas faritaj de la aŭtoro. Temas pri geinfanoj, membroj de Itaosy Esperanto-Klubo en Antananarivo. Ankaŭ li faris la foton kaj ilustraĵon en tiu ĉi libro.